

Christian Morgenstern,

Al amikino

tradukita de Willy Nüesch

“Ne lasu morti heroon en via koro!”
Se vi velkas kiel flor’ en aŭtuno, -
tamen ne ĉesu aspiri pri l’ krono de floro!

Ĉiuj aliaj kronoj certe postrestos,
svenos kiel la membroj de ili kovrataj ...
sur la granda ponto nur tiu vin vestos -

al vi supre la frunton spiritan drapiros;
kaj estonte, kiam vi ree descendis,
ĉirkaŭfluita de sankta brilo vi iros.

*Traduko de la Germana poemo “An eine Freundin” de CHRISTIAN MORGENSTERN (Kristiano Matenstelo, *1871-05-06 – †1914-03-31) en Esperanton de WILLY NÜESCH (Ettelstr. 6, CH-8634 Hombrechtikon, Svislando, *1927-05-09) en 2003-10.*

Arg-70-137 (2013-08-28 18:32:09)

La tradukinto Willy Nüesch (Ettelstr. 6, CH-8634 Hombrechtikon, Svislando, telefono: +41-(0)31-302 66 56) donis al mi, Manfred Retzlaff, la permeson publikigi siajn poem-tradukojn en mia interreta poem-kolekto „Argiope.bl0rg.net“. Li ankaŭ kontrolis tiun ĉi elpresaĵon kaj mi korektis tajperarojn laŭ liaj indikoj. Tiu ĉi lia traduko aperis en la literatura revuo “Fonto” n-ro 274 en Oktobro 2003.